

La nova Ĉinio estas ekonomie sukcesa



**Ĉu fine solvo
en Kosovo?**

**Budhismo
en Taĝikio**


**Surĉevala arkpafado
en Hungario**



Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



La paŝo senelirejen: La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



Dialogo inter surduloj: Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

Prezo: po 6 eŭroj + afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Ĉu fine solvo?

Pasis jam pli ol ok jaroj, post kiam la internacia komunumo intervenis en la sanga konflikto en Kosovo. Ekde tiam administris la landon UNMIK, aŭspiciata de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Pacon certigis milita strukturo KFOR, aŭspiciata de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Antaŭvidite estis, ke post tri jaroj kosovanoj partoprenu referendumon por determini la estontecon de sia lando.



SOLDIER'S MEDIA CENTER

9

Ne nur sporto, ankaŭ vivoformo

en Hungario funkcias internacia lernejo, kun hungarlingva instruado, pri arkpafado. Kial ili elektis sporton tian? Kelkaj lernis rajdi, kaj intertempe alproksimiĝis al arkpafado. Aliaj komenciĝis per arkpafado, kaj dume ekis amo al ĉevaloj. „Ne nur sporto, sed ankaŭ vivoformo,” ili diras.



LOVASIUSZ HAGYOMÁNYOKO SPORTÉRTESÜLET

14

La nova Ĉinio estas ekonomie sukcesa

En oktobro 2007 la nova Ĉinio festis sian 58an datrevenon. Dum pli ol duona jarcento, danke al la klopodado de la ĉina registaro kaj ties popolo, la ekonomio de Ĉinio stabile kaj rapide disvolviĝis.

18

Budhismo en Taĝikio

En Taĝikio oni rajtas konfesi ajnan religion krom fundamentisman. Oni konfesas plej vaste islamon. Ankaŭ budhismo havas siajn adeptojn, kvankam malmultnombre. Por iom ekscii pri la historio de budhismo en Taĝikio, ni turnis nin al membro de la Akademio de Sciencoj de Taĝikio, la direktoro de la Instituto pri Historio, Etnografio kaj Arkeologio, prof. Rahim Masov.



SEAN MCGRATH

19

politiko

Komentario	8
Kiu estas la perfidulo?	
Kosovo	9
Ĉu fine solvo?	
Rifuĝintoj	9
Timo senlima	
Belgio	10
Rekonu unu la alian	
Litovio	11
Vizoj reviziitaj	

moderna vivo

Naĝado	12
Mar-atono	
Ĵurnalismo	12
Atesto postamenta	
Arkitekturo	13
Oblikve-ŝike – sed prefere dike brike	
Arkpafado	14
Ne nur sporto, ankaŭ vivoformo	
Recikligo	16
G-ran-da sukceso	
Transporto	17
Koridoroj kien?	
Brulanta afero	17

ekonomio

Ĉinio	18
La nova Ĉinio estas ekonomie sukcesa	

spirita vivo

Intervjuo	19
Budhismo en Taĝikio	
Religio	21
Diservoj en diversaj lingvoj	

libroj

Simpatia vulgariga fakliteraturo	22
La neforgesebla Ada	23
Stilo rekta, senafekta, pri reala mondo malperfekta	24

novelo

En granda urbo	25
-----------------------------	----

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je **belga** banko en **eŭroj**. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto	MONATO			La JARO aere	
	surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	23	27	13,8	5 9
Aŭstralio	AUD	82	90	49,2	9 17
Aŭstrio	EUR	49	53	27,6	5 9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5 9
Brazilo	EUR	23	27	13,8	5 9
Britio	GBP	34	37	20,4	4 6,5
Bulgario	EUR	25	29	15	5 9
Ĉeĥio	EUR	33	37	19,8	5 9
Danio	DKK	365	395	219	40 70
Estonio	EUR	25	29	15	5 9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Francio	EUR	49	53	29,4	5 9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5 9
Germanio (or.)	EUR	45	49	27	5 9
Grekio	EUR	45	49	27	5 9
Hispanio	EUR	45	49	27	5 9
Honkongo	EUR	41	45	24,6	5 9
Hungario	EUR	25	29	15	5 9
Irlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Islando	EUR	49	53	29,4	5 9
Israelo	EUR	41	45	24,6	5 9
Italio	EUR	49	53	29,4	5 9
Japanio	JPY	7900	8500	4740	860 1460
Kanado	CAD	73	78	43,8	9 15
Kipro	EUR	33	37	19,8	5 9
Koreio	EUR	41	45	24,6	5 9
Kostariko	EUR	23	27	13,8	5 9
Kroatio	EUR	25	29	15	5 9
Latvio	EUR	25	29	15	5 9
Litovio	EUR	25	29	15	5 9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5 9
Malto	EUR	33	37	19,8	5 9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Norvegio	NOK	390	430	234	45 71
Nov-Zelando	NZD	95	103	57	10 18
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22 36
Portugalia	EUR	41	45	24,6	5 9
Rusio	EUR	23	27	13,8	5 9
Singapuro	EUR	41	45	24,6	5 9
Slovakio	EUR	25	29	15	5 9
Slovenio	EUR	33	37	19,8	5 9
Sud-Afriko	EUR	41	45	24,6	5 9
Svedio	SEK	460	495	276	49 84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9 15
Tajvano	EUR	41	45	24,6	5 9
Usono	USD	69	75	41,4	8 13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5 9

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libro servo@esperanto.org.au.
- **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoficejo@esperanto.fi.
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinete.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsi. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.

- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr.
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zeiric@eunet.yu.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: beritl.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.

Fum-karnavalo



Karnavalo ĉi-jare estas relative mallonga, ĝi finiĝas jam la 5an de februaro. Tion oni bedaŭras precipe en germana Rejnlando, la plej tradicia kaj furora karnavala regiono de Germanio. Sed la „frenezuloj“ (kiel karnavalistoj mem nomas sin) kontraŭ tio ne povas protesti. Tamen ili protestis kontraŭ malpermeso de fumado, kiu laŭ nova leĝo ekvalidis komence de 2008 en ĉiuj restoracioj kaj trinkejoj, do ankaŭ en haloj, en kiuj oni festas karnavalon. La protesto efikis: la registaro prokrastis la leĝon ĝis post la karnavalo. Freneze, ĉu ne? Pri tia escepto aliaj fumgermanoj povas nur reŭi. Ekzemple en Bavario la malpermeso validas ankaŭ dum karnavalo, kvankam en tiu parto de Germanio oni same fervore karnavalas, laŭ alia maniero, precipe per baloj. Tio mirigas, ĉar Bavario tradicie fiera estis tre liberala lando. Sed la plej rigoran fumleĝon de tuta Germanio realigis ĝuste la bavara parlamento.

Germanio estas federacia ŝtato. Fummalpermeson povus decidi ankaŭ la federacia parlamento en Berlino, sed en la dua ĉambro, kiu reprezentas la federaciajn landojn, oni kontraŭis tutgermanan leĝon. Tial ĉiu unuopa lando preparis apartan leĝon. En preskaŭ ĉiuj escepte de Bavario oni allasis esceptojn. Vojaĝanta fumanto tial en ĉiu federacia lando devas demandi, kie oni rajtas fumi kaj kie ne. Ankaŭ en Bavario oni intencis unue havi esceptojn, precipe por „bier-

tendoj“; tiuj estas grandegaj tendoj, en kiuj blvorkestroj ludas laŭtan muzikon kaj vizitantoj drinkas ekscese bieron ĝis ebrio kaj – kompreneble – fumas. Tiajn biertendojn oni trovas en ĉiuj folkloraj bavaraj festoj kaj precipe en la mondfama oktobrofestoj de Munkeno. Tuj ekribelis la tondomastroj kontraŭ la leĝo, kiu laŭ ili detruas la bavaran gastronomian kulturon. Sed la registaro restis rigora: protekto de nefumantoj estas pli grava ol tia kulturo, ĝi argumentis. Nun do en preskaŭ ĉiuj okcidentaj ŝtatoj validas malpermeso de fumado. Tamen Eŭropa Unio daŭre subvencias kultivadon de tabako ... Ankaŭ freneze, ĉu ne?

Kvankam mi vivas en Bavario, por mi ne gravas. Biertendojn mi ne vizitas, ĉar mi ne eltenas la laŭtan muzikon. Kaj restoraciojn mi malofte vizitas, ĉar iliaj prezoj estas (g)astronomiaj. Do trankvile mi ankoraŭ povas ĝui mian piron, hejme kaj sub libera ĉielo, ĝis leĝo aŭ mia kuracisto malpermesos ankaŭ tion.

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.

Rete: chefredaktoro@monato.net.

revizianto:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kovács, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseoj:** Sendu al la koncerna redakto, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandsprese, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** Monato, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzoroj oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koi-gakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congle-

ton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** Nicola Ruggiero, via Trento, 59 I-70042 Mola di Bari (BA). Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienso:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienso@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/a 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandsprese, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Etnaj hungaroj de Ĉeĥoslovakio

La dekretoj de Beneš (MONATO 2007/12, p. 9) ja forpelis hungarojn el Ĉeĥoslovakio.

Inter novembro 1938 kaj aprilo 1939 la hungara registaro nazieme per la helpo de Hitler ricevis ĉeĥoslovakian teritorion kun 1,6-miliona loĝantaro, el kiuj malpli ol la duono estis etne hungaroj. Post la malvenko de nazia Germanio la plimulto el ili ne ricevis la ĉeĥoslovakian civitanecon, krom se ili montris fidelecon al la Ĉeĥoslovaka Respubliko. Ĉirkaŭ 30 000 memvole migris al Hungario; aliaj deklaris, ke ili estas slovakoj. Ĉirkaŭ 25 000 estis forpelitaj al Hungario pro militkrimoj kaj kunlaboro.

Plie dum 1947 per kvarpotenca (usona, sovetia, brita, franca) konsento okazis loĝantar-interŝanĝo de 70 000

homoj. Tiu cifero kompareblas kun la forpelo de 3 milionoj da etnaj germanoj (preskaŭ la tuto) el Ĉeĥoslovakio kaj 240 000 el Hungario. En 1948 la ĉeĥoslovakaj hungaroj rericevis siajn civitanajn rajtojn.

Maljusteco estas ia kolektiva puno. Tamen post 60 jaroj ne eblas politike aŭ praktike nuligi la dekretojn de Beneš. La slovakoj, kiuj defendas la dekretojn, kaj la hungaroj, kiuj postulas ilian nuligon, estas malbonemuloj. Ni ne deziras ilin sur la paĝoj de MONATO.

Peter BOWING
Hungario

Kiuj sendependiĝu?

Verŝajne Kosovo estos perdita por Serbio, kaj baldaŭ la kosovanoj anoncos sian sendependiĝon siaflanke. Tion tuj multaj landoj aprobas, kaj do estos

kreita precedenco. Ĉu post tio ja ne rajtos fari same Abĥazio kaj Sud-Osetio, kiuj fakte jam nun apartas de Kartvelio? Eble sekvos tion Aĝario? Nu, ili ankaŭ antaŭe estis aŭtonomaj respublikoj. Sed estas ankoraŭ aliaj konfliktaj aŭ problemaj teritorioj: Ĉednestra Moldava Respubliko, Darfuro, norda turka Kipro, Karabaĥo, Eŭskio, Nord-Irlando, Skotlando, Kurdio, Korsiko, Vojvodino, Krimeo, Valonio, Tajvano, Tibeto, kaj mi povas al vi prognozi aliajn eventualajn disputeblajn teritoriojn, se interesos. Ankoraŭ en la antikva tempo estis dirite: dividu kaj regu! Tion sekvas Usono, ĉu ne? Ekde la apero de la lando el unuaj 13 ŝtatoj! Tamen ekzistas bumerango kaj ĝia principo.

Sergeo YURICH
Rusio

La rubriko „Leteroj“ estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualizaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Koruptado en Ukrainio

Siatempe en MONATO oni rakontis pri relative alta nivelo de koruptado en Brazilo. Tiam, kiam mi legis tiun artikolon, mi iom miris, ĉu nialandaj koruptuloj ne avangardas?

Laŭ konsideroj de kompetentaj organoj en Ukrainio avangardas en koruptado reprezentantoj de juĝsistemo. Dum nur dek monatoj de la pasinta jaro nur en Ĥarkovo pro koruptado estis preparitaj 345 juĝprocesoj. En 2006 okazis 358 procesoj pro koruptado.

Dmitrij CIBULEVSKIJ
Ukrainio

Batila batalo

En la eseo *Batila batalo* (MONATO 2007/12, p. 15) Garvan Makaj parolas pri la „mistero“, ke Usono „eksportas ne siajn plej bonajn, belajn kaj noblajn varojn, sed siajn malpli dezirindajn, malpli belajn, kaj malpli utilajn“. Tio ne tre misteras: firmaoj ne eksportus tiajn varojn, se tiom multaj homoj en diversaj landoj ne volus aĉeti ilin! Spite la aserton en la artikolo, Usono eksportas ankaŭ bonajn, belajn, kaj noblajn varojn ... sed sufiĉe multaj homoj evidente preferas la malnoblaĵojn ...

Russ Williams
Pollando

Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.



Modera espero

de Stefan MAUL

La jaro 2007 finiĝis per esperiga signalo: meze de decembro la klimat-konferenco de Balio decidis denove intertraktadi pri batalo kontraŭ la klimatsanĝo. Nova traktato sekvu post du jaroj la konatan Kioto-protokolon, kun la celo ĝis 2020 draste redukti forĉejajn gasojn.

Prioritato de scienco

Estas precipe tri punktoj en la interkonsento de Balio, kiuj permesas moderan esperon: La intertraktado okazos sub la tegmento de Unuiĝintaj Nacioj (UN). La mandato validas por ĉiuj 190 ŝtatoj. Kaj ĉiuj ŝtatoj povas mem kontribui al protekto de la klimato. Por la industri-landoj estas (laŭ la teksto) „devigoj”, por la sojlo- kaj evolu-landoj „agadoj”. Precipe grave estas, ke nun la scienco destinas la direkton kaj gvidos en la intertraktado. La sciencaj ekkonoj estas komplete agnoskataj kiel bazo, neniu plu pridubas ilin. Tio estas malo de la ĝisa situacio, karakterizita de la Kioto-protokolo, kiu donis prioritaton al politiko.

Kvankam en la baza dokumento de Balio ne estas menciataj konkretaj celoj, tamen en piednoto ĝi indikas tri konkretajncitaĵojn en la raportodela UN-klimatkonsilio, kiuj enhavas ciferojn. Laŭ ili la industriŝtatoj reduktu siajn emisiojn ĝis 2020 je 25 ĝis 40 elcentoj, la tuta mondo ĝis 2050 je pli ol 50 elcentoj. Kaj en krom-dokumentoj por la Kioto-ŝtatoj troviĝas la konkretaj ciferoj kaj estas indikita kiel celo laŭeble modesta altiĝo de la temperaturo. Tio estas klara progreso, ĉar la teksto postulas ankaŭ de ŝtatoj, kiuj ne subskribis la Kioto-protokolon (ekz. Usono),

„kompareblajn agadojn” – kaj tion akceptis ankaŭ Usono.

Giganta progreso

La fakto, ke 190 ŝtatoj entute kapablis interkonsenti pri komenco de novaj intertraktadoj, kaj ke oni indikas jam nun unuajn celojn ĝis 2020, en si mem estas giganta progreso por savi la klimaton. Kaj ke finfine eĉ Usono, kies prezidanto estas inter la plej obstinaj kontraŭuloj de tutmondaj rimedoj, aliĝis al tiu interkonsento kaj revenis sub la gvidon de UN, estas ne nepre atendita sukceso.

La rezultoj de Balio estas precipe merito de Eŭropa Unio (EU), kun Germanio ĉepinte. Ties kanceliero Angela Merkel (ŝi komencis sian karieron kiel ministro pri medio) jam dum la kunveno de la G8-ŝtatoj en 2007 sukcesis logi la usonan prezidanton en komunan respondecon. EU estas kuraĝa protagonisto de mediprotektado, ĝi estas preta porti grandan parton de la pezo. Kaj ĝi kun pacienco sukcesis konvinki

la sojlo-landojn Barato, Brazilo, Ĉinio kaj Sud-Afriko forlasi sian bremsan pozicion.

Kaj Usono?

Tamen restas la problemoj Usono. Certe prezidanto George W. Bush [ĝorĝ dablju buŝ] provos plu defendi la interesojn de la usona ekonomio kaj tial pli ol hezitos kuniri sur komuna vojo al savo de la klimato. Sed Bush perdis jam tiom da reputacio, ke dum la resta jaro de sia regado probable li ne plu povos multe bremsi, ĉar ĉe multaj aliaj politikistoj kaj granda parto de la popolo lia konduto estas ne plu akceptata. La du venontaj jaroj decidus pri la estonteco de tutmonda klimatprotekto, kaj la demando estas, ĉu oni sukcesos Usonon gajni ne nur por kunagado, sed ankaŭ por gvida rolo. Ĉar sen tiu lando kun gigantaj venenaj emisioj ĉiuj klopodoj restos nur duonefikaj. Se oni ne sukcesos tutmonde redukti la emisiojn, UN fiaskos vid-alvide de la plej granda defio, kiun iam ajn alfrontis la homaro. ■

MIGUEL A. LOPES



Kiu estas la perfidulo?



DAMIR MRAVUNAC

Mi estis plurfoje akuzita pri perfido de mia popolo kaj patrujo depost 1991, kiam mi forlasis Kroation. En tiu jaro disfalis la ŝtato Jugoslavio, laŭ mia ĝistiam a edukado mia patrujo, kaj ekestis Kroatio, kiun mi sentis same kiel mian patrujon, ĉar mi jam tiam havis duoblan edukon pri du patrujoj.

Tamen mi forlasis tiun patrujon kaj foriris al Slovenio ĉefe pro du kaŭzoj. Unue, la nova ŝtato (mia nova patrujo) havis komplete kontraŭajn bazajn valorojn ol mi. Ĝi uzis amaskomunikilojn por disvastigi malamon kontraŭ kelkaj popoloj – ĉefe serboj, poste ankaŭ islamanoj en Bosnio, kaj ankaŭ kontraŭ nekatolikaj religianoj. Ĝi ŝanĝis edukcelojn en bazaj kaj mezaj lernejoj, en kiuj oni insistis esence nur pri kroatismo kaj grandiozeco de kroataj ideoj, ĝis absurdaj ideologioj, kiuj asertas, ke kroatoj havas arjan persan devenon, kaj ke la nacieco estas provebla en genoj kaj sango.

Due, mi ne volis doni mian vivon por celoj, kiujn elpensis kroataj politikistoj, kiuj uzis la militon por riĉiĝi kaj riĉiĝi siajn parencojn kaj amikojn.

Mortpuno

Mi efektive forlasis la landon: tiel, el la vidpunkto de tiuj, kiuj akceptis la retorikon, ke necesas doni sian vivon por defendi sian patrujon, mi estis perfidulo. Siatempe perfiduloj estis punataj per mortpuno.

Sed tiu tempo estas tempo de klasika burĝnacia difino de la patrujo. En la burĝnacia periodo, kiu parte daŭras ankaŭ nun, aparte en malpli evoluintaj landoj, la ŝtaton oni difinas: nacio estas ŝtato. Do ĉiuj, kiuj loĝas sur teritorio de iu ŝtato, estas nacioj de tiu ŝtato. Ĉiuj, kiuj havas francan pasporton, estas francoj. Ĉiuj, kiuj havas francan apartenon, estas devigitaj servi al sia patrujo, interalie ankaŭ kiel soldatoj, se tiu ŝtato militas.

La decidon, ĉu ŝtato militos aŭ ne, faras politikistoj, kiuj decidas baze de interesoj de la reganta elito. La vivoj de la homoj dependas de tio, ĉu la burĝa elito en la lando bezonas pli da teritorio por havi pli grandan merkaton kaj profiton, kaj ĉu ĝi taksas tion ebla.

Sanktaĵo

Oni kreis nacian ideologion, kiu estis proklamita „sanktaĵo“, pri kiu oni ne rajtas dubi. Ĉiu devas defendi sian sanktan patrujon, kaj se la ŝtato (senpersona forto) decidas, ke ni estu mobilizitaj kaj fariĝu instrumentoj, kiuj mortigos aliajn homojn kaj estos mortigitaj, ni devas obei. Ja temas pri sanktaĵo: multe pli gravas tiu sanktaĵo ol mia propra vivo.

Nuntempe la nova informatika teknologio malrapide detruas tiuspecan nacian ŝtaton. Por profito ne plu gravas tereno, sed evoluinta merkato, en kiu ekzistas laŭeble multaj aĉetkapablaj personoj. Defendi la ŝtaton aŭ agresi alian ne plu povas armataj nacioj, sed edukitaj profesianoj, kiuj scipovas uzi komplikajn aviadilojn, radarojn, tankojn, satelitojn.



Por havi progreson kaj potencon ne plu gravas amaso da samnaciaj laboristoj, sed alte edukitaj fakuloj, el kiu ajn parto de la mondo. Naciaj kredoj kaj fantaziaĵoj pri grandiozeco de la nacia historio ne plu sufiĉas por teni la naciojn de la propra nacio hejme. Homoj ĉiam pli amase forlasis „la patrujon“ kaj serĉas lokon por sia vivo tie, kie oni ofertas pli bonajn vivkondiĉojn. Modernaj informiloj malsanktigas ĉiun sanktaĵon. Oni ne plu kredas al la ŝtato – ĉar ja la ŝtato estas politikistoj, kiuj daŭre mensogas kaj klopodas manipuli per la vero.

Privilegioj

Kiu estas pli granda perfidulo: mi, kiu intence ne volis defendi la privilegiojn de tudjmana kliko (kiajn nekredeblajn krimagojn, apenaŭ konatajn, faris Franjo Tudjman, la unua prezidanto de Kroatio, kaj liaj subtenantoj?), aŭ la prezidantoj de la nunaj registaroj de Slovenio kaj Kroatio?

Tiuj prezidantoj interkonsentis (laŭ aserto de la eksa registarprezidanto de Slovenio) pri landlimaj incidentoj, kiam la slovena prezidanto petis la kroatan, ke la kroata polico transiru la maran landlimon. Tiel la slovena prezidanto, tiam gvidanto de la opozicio en Slovenio, havis pretekston por ataki la eksan registaron, dirante, ke ĝi nesufiĉe faras por defendi sian teritorion. Tiel la kroata prezidanto ebligis al sia konservativpartia kolego gajni la balotojn, kies prezo estis disŝuto de malamo inter la du popoloj.

Zlatko TIŠLIJAR
Slovenio

Ĉu fine solvo?

Pasis jam pli ol ok jaroj, post kiam la internacia komunumo intervenis en la sanga konflikto en Kosovo. Ekde tiam administris la landon UNMIK, aŭspiciata de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Pacon certigis milita strukturo KFOR, aŭspiciata de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Antaŭvidite estis, ke post tri jaroj kosovanoj partoprenu referendumon por determini la estontecon de sia lando.

Referendumo, tamen, ne okazis. Tial la internacia komunumo decidis sendependigi Kosovon, kie pli ol 90 % de la loĝantaro konsistas el albanetnuloj aŭtoĥtonaj, disde Serbio, al kiu ĝi jure ankoraŭ apartenas. Tiurilate estas lastatempe diskonigita la plano de la eksa fina prezidanto Matti Ahtissari por difini la novan statuson de Kosovo.

Akceptis la planon albanoj. Male Serbio, subtenata de Rusio kaj aliaj landoj, inkluzive de Grekio kaj Kipro. Tiuj ĉi lastaj landoj argumentas, ke tia sendependiĝo kuraĝigos alilandajn etnojn ribeli kaj same postuli sendependecon.



Adminstras Kosovon UNMIK, aŭspiciata de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Pacon certigas milita strukturo KFOR, aŭspiciata de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO)

Mondaj „problemejoj”

Por kontentigi Serbion oni proponis diversajn variaĵojn de la plano, ekzemple la traktat-modelon de la iamaj du Germanioj, Tirolo, Honkongo kaj similaj. Tamen ekzistas nenia similaĵo inter Kosovo kaj aliaj „problemejoj” de la mondo. La celo en Kosovo estas atingi „malpli ol sendependecon kaj pli ol aŭtonomecon”.

Intertraktado inter Serbio kaj Kosovo restas senfrukta. Albanoj en Kosovo indikas, ke, se daŭre forestos progreso,

ilia parlamento mem proklamas sendependecon. Serbio minacas per milito, precipe per neregulaj kaj ŝovinismaj trupoj. Ĝenerale oni kredas, ke nek Usono nek Eŭropa Unio hezitos subteni sendependan Kosovon.

Tial oni ne nur redonos nacian rajton al albanoj, kies teritorioj estas disdonitaj en 1912 al slavaj kaj grekaj najbaroj, sed ankaŭ firmigos politikan stabilecon en tiu ĉi maltrankvila angulo de Eŭropo.

Bardhyl SELIMI

RIFUĜINTOJ

Timo senlima

Nepalon kaj Baraton dividas la dua plej longa malferma landlimo en la mondo (la unua situas inter Usono kaj Kanado). Nepalanoj kaj baratanoj povas libere vojaĝi inter la du ŝtatoj, tiel ke eksterlando kredas, ke temas pri unusola lando.

Eblis same facile vojaĝi al Butano, apud orienta Nepalo. Multaj nepalanoj ekloĝis en Butano, aĉetante terpecojn kaj domojn. Tamen ekde 1990 tien vojaĝi pli malfacilas. Nuntempe eksterlandanoj

rajtas viziti nur du el la dek regionoj en Butano kaj ne facilas akiri vizojn. Tiurilate agas Butano laŭ la volo de Barato.

Nepalparolantoj

Ĉi tiun situacion kaŭzis almenaŭ parte la fakto, ke en Butano kreskas la nombro de tiuj, kiuj estas nepaldevenaj, kiuj parolas la nepalan, sed kiuj neniam estis en Nepalo. Butano kaj eble Barato timas, ke baldaŭ, eble post dek jaroj, estos pli da nepalparolantoj en Butano ol butananoj.



Rezulte, Butano elpelis nepaldevenajn civitanojn, kiuj nun loĝas kiel rifuĝintoj en Jhapa, la plej sud-orienta parto de Nepalo, kaj ankaŭ en la distrikto Morang, ankaŭ en la sud-oriento. Ĉi tiuj homoj volas reveni al siaj hejmoj en Butano, kie la pli junaj eĉ naskiĝis. Pro tio ili ĝis nun malakceptas invitojn de Aŭstralio kaj de Usono translokiĝi kaj komenci en nova lando novan vivon.

Navin SHRESTHA/pg

BELGIO

Rekonu unu la alian

Post sia fondo en 1830 Belgio estis franclingva lando, kies plimulto parolis nederlande. Lokaj publikaj servoj en Flandrio ofte uzis la nederlandan, sed ĉiu funkciulo kaj ĉiu uzanto de la servoj rajtis paroli nur france kaj postuli respondon en la franca.

En 1932 oni enkondukis unulingvajn regionojn, sed ties limoj estis ŝanĝeblaj. Municipoj kun pli ol 70 % da uzantoj de la sama lingvo estis regataj en tiu lingvo; la aliaj estis dulingvaj, kaj tiun nombradon oni regule refaris. La rezulto estis, ke la francigo de Flandrio malplirapidigis, sed tamen daŭris.

Pro tradicio, pro la internacia prestiĝo de la franca, kaj pro la (tro?) bona lingvoinstruado en flandraj lernejoj, franclingvanoj povis facile ekloĝi en flandra municipo. Ili tre afable diris, ke bedaŭrinde ili ne bone parolas la nederlandan, do ili estis helpataj; ne trovis tempon lerni la lingvon, do ili estis daŭre helpataj, kaj diris al kolegoj kaj amikoj: „Venu ĉi tien, vi tute ne bezonas lerni la nederlandan.” Post kelkaj jaroj ili fariĝis 30 %, kaj ĉiuj lokaj funkciuloj devis eklerni la francan.

Ĉefurbo

En 1963 la lingvolimo estis fiksita. Nur la ĉefurbo restis dulingva (la tiama situacio), kaj kelkaj municipoj ricevis specialan reĝimon: unu oficiala lingvo por la interna funkciado de publikaj servoj, sed la rajto por loĝantoj esti helpataj en alia lingvo. En pluraj municipoj (franclingvaj kaj nederlandlingvaj) ĉe la limo inter Flandrio kaj Valonio tio helpis integri la „fremdlingvulojn”. Nur en ses nederlandlingvaj municipoj apud Bruselo, la efiko estis inversa: ili daŭre estis invaditaj de franclingvanoj, kiuj nun postulas ŝanĝon de sia statuso.

La tuta franclingva gazetaro kaj ĉiuj valonaj partioj subtenas tiun postulon: en la ses municipoj oni prefere uzu la

francan. Eble ne multaj volas batali por tio, kaj multaj valonoj eĉ preferas la nunan situacion, kiu ankaŭ protektas ilin kontraŭ ebla invado de la nederlanda. Oficiale neniu partio defendas tiun opinion.

Sed la tuta nederlandlingva gazetaro kaj ĉiuj flandraj partioj diras ne: la municipoj estas flandraj kaj restu flandraj. Eble kelkaj apartiĝemuloj koncedus kontraŭ rekonon de sendependeco por la cetera Flandrio, sed la granda plimulto volas resti ĉe Belgio. Oni timas, ke post tiuj municipoj aliaj estos invaditaj, kaj ke la lingvokvereloj neniam finiĝos. Estas eĉ pro tiu lingvolimo, ke ili amas Belgion, kiun ili prezentas kiel ekzemplon por Eŭropo: rekonu unu la alian, rekonu la unikecon de ĉiuj, sed kunlaboru por komunaj celoj.

Sociala sekureco

En aliaj aferoj estas flandroj, kiuj estas maljustaj. Nur malmultaj en Flandrio ankoraŭ aŭdacas defendi la socialan sekurecon, kiu (dum la lastaj jardekoj, ne antaŭe) kostas meznombre pli al la (pli riĉaj) flandroj, sed profitigas pli al valonoj.

Tiaj kontrastoj ekgravas pro la ekzistado de „du landoj” en Belgio: du gazetaraj preskaŭ ne legataj de la alia lingvokomunumo; partioj, kiuj preskaŭ ĉiuj estas unulingvaj; kaj elektoj, en kiuj ĉiu kandidato respondas nur pri elektantoj el sia propra lingvokomunumo.

Por kontraŭi tiun tendencon, kaj reunigi la landon, kelkaj politikaj sciencistoj el ambaŭ landopartoj proponis, ke

parto de la parlamentanoj estu elektata de la tuta lando. Konkrete ili proponas (*paviagroup.be*), ke ĉiu elektonto havu du voĉojn por elekti la ĉambron de reprezentantoj (unu el la du partoj de la federacia parlamento): unu voĉon por elekti 15 kandidatojn, kiuj prezentiĝas al la tuta ŝtato, kaj unu voĉon por elekti reprezentanton de sia provinco (la 135 aliaj membroj de la ĉambro).

Dulingvaj listoj

Por plifaciligi la voĉdonadon al alilingvaj kandidatoj, ili proponas garantii, ke el la 15 elektotaj reprezentantoj, naŭ estu nederlandlingvaj kaj ses franclingvaj. La kandidatoj povos prezentiĝi en dulingvaj listoj (ekzemple de dulingvaj partioj), sed ankaŭ ligitaj listoj eblos: unu franclingva kaj unu nederlandlingva partio, kiuj deklaras sin solidaraj, kaj kies voĉoj en unua paŝo estos adiciataj.

Pri la detaloj oni ankoraŭ diskutas, sed pri la principo ĉiuj franclingvaj partioj jam konsentas. En Flandrio nur la apartiĝemaj partioj (ekstremdekstruloj kaj naciistoj) kontraŭas. Liberaluloj, socialistoj kaj verduloj estas por. La kristandemokrata partio ankoraŭ ne diris sian opinion. Ĝi ne volas rompi la aliancon, kiun ĝi havas kun la naciistoj.

Se la politikistoj trovos eliron el la nuna krizo, se ili sukcesos fari novan registaron kaj trovi la specialan plimulton necesan por ŝanĝi la konstitucion, unu el la reformoj, kiuj sekvos, certe estos plifirmigo de la tutfederacia demokratio. Kaj belgoj denove estos fieraj pri sia lando.

Martin DECALUWÉ



Vizoj reviziitaj

La 21an de decembro pasintjare estas forigitaj diversaj landlimaj barieroj en Eŭropo, ĉefe en la novaj EU-landoj Ĉeĥio, Estonio, Hungario, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Slovakio kaj Slovenio. La koncernaj ŝtatoj aliĝis al la t.n. Ŝengen-zono, kiu permesas liberan interŝtatan cirkuladon de homoj.

Tiu ĉi ekaplikado de la Ŝengen-principo estas la plej granda, post kiam antaŭ 22 jaroj en la luksemburga urbeto Ŝengen kvin landoj interkonsentis nuligi reciprokan landliman kontroladon. Nun la Ŝengen-principo aplikeblas en 24 eŭropaj landoj, inkluzive de Islando kaj Norvegio, kiuj ne membras en la EU.

Grava defio

En Litovio, la instancoj taksas la „ŝengenigon” de la lando grava defio. Malgraŭ tio, ke internaj kontroloj malfortiĝis, eksteraj – aparte ĉe la landlimoj litova-belorusa kaj litova-rusa (kaliningrada enklavo) – fortiĝis.

Rezulte, dum litovoj ĝojas pro pli facilaj vojaĝoj en Eŭropo, najbaroj en apudaj landoj plendas. Belorusoj, ekzemple, havas multajn parencojn en apudlimaj regionoj de Litovio. Antaŭe, por akiri litovan vizon, ili pagis 12 eŭrojn. Nun ili pagas ĝis 60. La litova ministrejo pri eksterlandaj aferoj provis konvinki la Eŭropan Konsilion, ke la prezo estas tro granda. Tamen malnovuloj en EU decidis ne escepti Belorusion.

Limigitaj rimedoj

Litovio havas limigitajn rimedojn por memstare plifaciligi vojaĝojn de belorusoj, ĉar pri tiaj pagoj decidas EU. La ĉefa rimedo, favora por belorusoj, povus esti traktato pri loka trafiko, laŭ kiu loĝantaj en zono ĝis 50 km for de la



Forigitaj estas barieroj inter Litovio kaj najbaraj eŭrop-uniaj landoj – tamen ne ĉiuj najbaroj kontentas.

limo rajtos alveni en la apudliman teritorion de najbara lando. Oni esperas tiel traktati en 2008.

Rusoj el la kaliningrada enklavo tiusence priĝuas pli favorajn kondiĉojn. Moskvo havas kontrakton kun EU por faciligi vojaĝojn de siaj civitanoj. Tial la viza prezo por civitanoj de Rusio ne ŝanĝiĝis kaj restas kiel antaŭe ĉe 35

eŭroj. Similajn kontraktojn kun EU havas ankaŭ Ukrainio kaj Moldavio.

Preskaŭ koincide kun la „ŝengenigo” desialandoekhavis litovoj novajn pasportojn. Komence de 2008 ekvalidis novstila dokumento kun 32 paĝoj. La novaj pasportoj estas ĉerizkoloraj samkiel dokumentoj de ĉiuj civitanoj de EU.

LAST

Verdaj litovaj pasportoj fariĝis ekde la komenco de la jaro ĉerizkoloraj konforme kun aliaj en Eŭropa Unio.



NAĜADO

Mar-atono



Pro ŝtormo Urbonas devis rezigni pri sia unua provo transnaĝi la Baltan Maron.



Konsterniĝis la 49-jaraĝa litova ultratratlonisto Vidmantas Urbonas pro la poluo en la Balta Maro. Por atentigi pri la problemo (ekzemple ĉiujare eniras la maron 55 000 tunoj da fosforo, ĝis 20 000 tunoj da pezaj metaloj), li decidis naĝi inter Svedio kaj Latvio – pli ol 200 km.

Kuraĝigas la sportiston simpatiantoj antaŭ lia provo fariĝi la unua, kiu naĝos inter Svedio kaj Latvio.



La konkerinto de la Balta Maro gratulas sian edzinon Rita.

Pro ŝtormo li devis interrompi sian unuan provon. Tamen la duan fojon li sukcese kompletigis la lastan 145-kilometran etapon (ĉi-foje en inversa direkto) inter Latvio kaj la insulo Gotlando. Entute la sportisto pasigis ĉirkaŭ 40 horojn en la akvo. Li dormis du horojn kaj ĉiun horon ripozis kvin minutojn por ripozi kaj manĝeti. Akompanis lin du jahtoj.

Urbonas estis la unua, kiu naĝe konkeris la Baltan Maron. Li planas nun transnaĝi la markolon inter Francio kaj Britio.

Laimius STRAZNICKAS



ĴURNALISMO

Atesto postamenta

En parko antaŭ la sidejo de la bulgara novaĵagentejo en Sofio estas konstruita dum la somero bronza monumento. La monumento, ĉ. 2,5 m alta, kaj skulptita de Stavri Kalinov, prezentas rulaĵon kun teksto en cirilaj literoj. Skulptita sur la rulaĵo estas plumo.

La malsupra parto de la rulaĵo estas en la formo de radikoj, enirantaj en

la postamenton kaj kelkloke elirantaj. Sur la postamento estas tabelo kun la teksto „La vero pri la plumo” kaj indiko, ke la monumento honoras bulgaran ĵurnalismen.

Preterpasas ĉiutage multaj homoj la monumenton, kiu, se ne unika en la mondo, certe maloftas.

Dimitar HAGHIEV

Oblikve-ŝike – sed prefere dike-brike

Vieno, kvartalo Spittelau: oblikvaj muroj sur oblikvaj betonaj palisoj. Ĉu rezulto de tertremo? Ne, temas pri konstruaĵo de la arkitektino Zaha Hadid, naskita en 1950 en Bagdado, kiu ĝis nun neniam konstruis loĝejojn tiajn.

Tamen moderneco superas hejmecon. Tial ĉiu dua loĝejo restis neloĝata. En la malhelaj koridoroj oni timas; krome la vojo al metroohaltejo aŭ magazenoj estas longa. Pro tio, en novembro 2006, bankrotis la konstru-firmao SEG. Ĝi perdis multe da mono de 400 kreditonintoj.

Ankaŭ konstruaĵoj kun vertikalaj muroj ne longe daŭras. Ekzemple, oketaĝa maljunulejo en la 19a distrikto de Vieno: konstruita en 1970, estos malkonstruata

Avangarda ne signifas profitodona: novaj loĝejoj ne popularas kaj la konstru-firmao bankrotis.

en 2010. Post nur 40 jaroj ĝi estas tiel kaduka kaj neniel renovigebla, ke oni neniigu ĝin.

Aliflanke staras en Vieno centmiloj da loĝejoj el la periodo 1860 ĝis 1915. Pro dikaj, brikaĵoj muroj kaj aliaj altkvalitaj materialoj ili estas facile modernigeblaj. Ili staros almenaŭ pliajn 200 jarojn.

Walter KLAG

Oketaĝa konstruaĵo kadukiĝis post nur kvar jardekoj ...



... dum klasikaj konstruaĵoj el la 19a jarcento daŭre dezirindas.

ARKPAFADO

Ne nur sporto, ankaŭ vivoformo



Juna knabino atendas kun aliaj, surĉevalo. Venas ŝia vico. Per la genuo ŝi puŝetas sian ĉevalon, kiu turniĝas, kun klinita kapo, kaj ekgalopas. La knabino, surdorse de la galopanta ĉevalo, alĝustigas sian pafkordon, elpafas sagon, kaj prenas jam sekvan sagon, kaj elpafas ankaŭ ĝin. La du sagoj, siblantaj, eniras la celtabulojn. Eĉ ne unu minuto pasis.

Jen parto de la trejnado de rajdantaj arkpafistoj. La knabino estas 17-jara,

sed en la grupo estas eĉ pli junaj. Kial ili elektis sporton tian? Kelkaj lernis rajdi, kaj intertempe alproksimiĝis al arkpafado. Aliaj komenciĝis per arkpafado, kaj dume ekis amo al ĉevaloj. „Ne nur sporto, sed ankaŭ vivoformo,” ili diras.

La komencantoj eklernas rajdi kun disetenditaj manoj por „disigi” la suban kaj supran partojn de la korpo. La suba korpo harmoniiĝu kun la ĉevalo; la supra – okuloj, brakoj, manoj – koncentriĝu pri la celo, la arko, la sagoj.

Sagopluvego

A sagittis Hungarorum, libera nos Domine („Liberigu nin de la hungaraj sagoj, nia sinjoro”): tiel sonis preĝo al Sankta Geminiano en la urbo Modeno en 924. Kronikistoj notis, ke hungaraj militistoj malofte batalis de proksime. Ili preferis ŝajnigi fuĝon kaj verŝi de malproksime sagopluvegon sur la kapojn de ofte pli multnombraj malamikoj.

Tiutempe en Eŭropo, Azio kaj Afriko estis ĝenerale uzataj t.n. longaj arkoj, kun longeco de 150–200 cm, el ligno, specife el taksuso (pro tio suferis taksusaj arbaroj en Anglio). Tamen la sciotoj, iran-devena gento, evoluigis kaj uzis pli mallongan, t.n. kunmetitan aŭ repuŝantan arkon. Ĝi estas kunmetita el tri materialoj: el ligna bazo, kies ekstera fleksebleco pliiĝis pro aldonita tendeno kaj ties interna forteco pro korno-pecetoj.

La preta arko havis C-formon: kun kordo fiksita al la du ekstremaĵoj ĝi ricevis D-formon. Fiksi kordon bezonis fizikan forton, krome lertecon: sen „truko” ne eblis tion fari. Dum pafado la du „brakoj” de la arko „repuŝiĝas”, kaj la rezultanta energio pluigas la forton de la eligata sago. Tiel eblas flugigi sagon 200 metrojn, foje ĝis 300.

Speciala selo

La militistoj tenis en la mano ofte kvar ĝis kvin sagojn. Galopante, ofte turniĝante malantaŭen, ili eligis ilin unu post la alia. Necesis speciala selo, kun pli alta pomelo, kiajn oni ankaŭ nun produktas kaj uzas laŭ historiaj priskriboj.



LOVASIÁSZ HAGYOMÁNYŐRZŐ SPORTEGYESÜLET

Ĉie en la mondo la lingvo de arkpafado estas la hungara. Ekde 1994 estas organizataj internaciaj konkursoj du fojojn jare en Hungario. Okazas konkursoj ankaŭ eksterlande. Konkursantoj devas elpafi de sur galopanta ĉevalo dum 18 sekundoj kiel eble plej multe da sagoj. Per mallongigo de la tempo eblas akiri pliajn poentojn, kaj gravas, kiom da sagoj kapablas enmane teni la konkursanto. Ankaŭ necesas lerte uzi la sagujon.

Internacia lernejo

Apartan signifon havas la vestaĵoj. Diverskoloraj kaftanoj, kun zontuko kaj pantalono, kaj la koloro indikas jam atingitajn rezultojn. Cetere en Hungario funkcias

internacia lernejo, kun hungarlingva instruado, pri arkpafado. Ĝin vizitis lernantoj el interalie Germanio, Ĉinio, Kanado, Nov-Zelando kaj Usono.

Ne facilas akiri la necesan lertecon. Bezonata estas speciala preparado. Laŭ Zsolt Keleman, kiu lanĉis rajd-programon por lernejoj, rajdado malkovras preskaŭ forgesitan mondon: la programo kontribuas al personeca, korpa kaj mensa evoluigo. Prizorgante la ĉevalojn, lernantoj respondecas pri alia vivanta estaĵo.

Tiel, laŭ fakuloj, surĉevala arkpafado evoluigas fizikajn kaj intelektajn kapablojn: rememoron, koncentriĝon, memregadon. Samtempe ĝi formas moralajn ecojn: volon, kuraĝon, disciplinon, adaptiĝemon al komunumo. Tiuj ecoj valoras ankaŭ en la nuna mondo.

Judit FELSZEGHY



TURUL - NEPE NAP FIA LOVASIÁSZ KÖR

RECIKLIGO

G-ran-da sukceso

Plastajn botelojn el plastaj boteloj por eviti rubon: tion kapablas plej moderna recikliga fabriko, kiu funkcias ekde oktobro 2007 en Vieno.

Uzitajn plastajn botelojn oni enĵetas en unu el 10 000 strangaspektaj ujoj nomataj Kermit, laŭ la rano Kermit, kiun multaj konas el la usondevena televida programo *Muppet Show*. Plastaj boteloj el polietileno estas valora kruda materialo, kies prezo estas 1000 eŭroj por 1000 kg. Krome oni ŝparas 60 % da energio, se oni produktas tiajn botelojn

el recikligita plasto kaj ne rekte el nafto.

La nova recikligejo estas konstruita dum nur naŭ monatoj kaj kostis 4 500 000 eŭrojn. La fabriko longas 140 m kaj altas 16 m. Ĝi povas prilabori hore kvar tunojn da plasto kaj jare 24 000 tunojn. La socialdemokrata politikistino Ulli Sima ĝojas, ke komunuma fabriko tia pli efikas ol la privata konkurenco. Detalaj informoj en la germana: www.ullisima.at.

Walter KLAG

Kermit: la Muppet-marionetoj furoris dum la malfruaj 70aj kaj fruaj 80aj jaroj – kaj eĉ poste.

La t.n. Kermit-ujoj en Vieno helpas ŝpari monon kaj energion.



Koridoroj kien?

Pasis pli ol ok jaroj post la lasta milito en Balkanio (en Kosovo), tamen la regiono posedas ankoraŭ malfortan transport-infrastrukturon. Multaj landlimaj vojoj restas blokataj, kaj necesas 20 horoj aŭte aŭ 36 horoj trajne por trapasi 1000 km inter orienta kaj okcidenta partoj de Balkanio (Nigra Maro kaj Adriatika Maro).

Kunlaboras nek la naŭ landoj de la regiono, nek Eŭropa Unio kaj grandaj internaciaj organizaĵoj por plibonigi transporton en Balkanio, kio nepras por antaŭenigi la ekonomion de la regiono, inkluzive de libera moviĝo de homoj.

La landoj en la regiono identigis tri ĉefajn arteriojn. La unua ligos Albanion kun Kosovo kaj suda Serbio. Ĝi jam estas komencita danke al projekto subtenata de la Monda Banko, la Eŭropa Banko por Disvolviĝo, privataj bankoj kaj landaj buĝetoj. Sed la elspezoj enormas. La parto ene de Albanio trapasanta grandan montaron kostos ne malpli ol miliardon da eŭroj.

Politikaj kialoj

La dua estas la vojo liganta Makedonion kun Bulgario. Tiu ĉi vojo delonge estis blokata pro politikaj kialoj. La tria vojo ligos sudan Bulgaron kun Grekio.

Eŭropa Unio siaflanke konsideras gravaj la t.n. okan koridoron inter Durrës (havenurbo albana ĉe Adriatiko) kaj Varno (havenurbo en Bulgario ĉe la Nigra Maro); la dekan koridoron ligantan Serbion kun Grekio; kaj la kvinan koridoron ligantan Slovenion, Kroation kaj Bosnio-Hercegovinon kun centra Eŭropo.



La unua aŭtovojo pleje interesas Italion kaj aliajn okcidentajn landojn, dum la dua pleje interesas Grekion. Tamen estiĝas rivaleco ene de Eŭropa Unio rilate financadon de la projektoj. Ĝis la jaro 2020 oni prognozas centelcentan

kreskon en la transporta volumo inter EU kaj Balkanio, kiu postulos pli da investado – des pli, ke nun ne plu ekzistas la antaŭaj politikaj baroj.

Bardhyl SELIMI

Brulanta afero

Antaŭ futbalmatĉo inter Albanio kaj Nederlando Vilson Alushi ĵuris bruligis sian novan aŭton, de la marko *Mercedes-Benz*, okaze de malvenko. Venkis la nederlandanoj, kvankam dubinde, pro diskutebla decido de la brita arbitraciisto. Tuj poste Alushi bruligis sian veturilon surstrate antaŭ multaj spektantoj.


Bardhyl SELIMI



Kontribuojn por la rubriko *Moderna Vivo* de MONATO kunlaborantoj sendu al moderna_vivo@monato.net.

La nova Ĉinio estas ekonomie sukcesa

En oktobro 2007 la nova Ĉinio festis sian 58an datrevenon. Dum pli ol duona jarcento, danke al la klopodado de la ĉina registaro kaj ties popolo, la ekonomio de Ĉinio stabile kaj rapide disvolviĝis.



MEP kreskis ĝis 21 087 miliardoj

La nova Ĉinio fondiĝis en 1949, sed la unua disponebla donitaĵo pri la malneta enlanda produkto (MEP) estas pri la jaro 1952: 67,9 miliardoj da juanoj. En 2006 la MEP de Ĉinio atingis 21 087,1 miliardojn da juanoj (nun dek ĉinaj juanoj egalas al unu eŭro). Ekde 1980, kiam Ĉinio komencis praktiki la politikon de ekonomia reformado kaj malferma pordo, la ekonomio kreskis kun jara meznombro de 9,7 %. Nun laŭ kvanto de MEP Ĉinio jam okupas la kvaran lokon de la mondo kaj proksimiĝas al Germanio. Tamen, laŭ pokapa MEP, en la vicordo almenaŭ 100 landoj antaŭas Ĉinion, kiu tiurilate ankoraŭ apartenas al la disvolviĝantaj landoj.

Jara meznombra salajro

En 1952 en la tuta lando la jara meznombra salajro de la oficistoj kaj laboristoj estis nur 445 juanoj, dum en 2006 ĝi atingis 21 001 juanojn. Ekde la komenco de la nova jarcento, la meznombra salajro ĉiujare pliiĝis je 2000 juanoj. En la plimulto de la ŝtataj institucioj kaj entreprenoj la salajra pliiĝo en 2006 eĉ estis pli.

Koncerna respondeculo en la ĉina ministrejo pri laborasekuro montris, ke nuntempe la rapida kresko de la salajroj de parto de la loĝantaro kun altaj enspezoj deturnas la atenton de la relative malrapida kresko de la salajroj por ordinaj oficistoj kaj laboristoj, kiuj dum pluraj jaroj ĉiam havis malaltan enspezon, kaj

ke la fenomeno, ke malmultaj riĉas kaj multaj malriĉas, restas tre grava. Li forte alvokis la centran registaron alpreni efikajn rimedojn por ne lasi la diferencon de la salajra distribuo pligrandiĝi.

Loĝejoj kaj aŭtoj

En la 1950aj kaj 1960aj jaroj en la urboj la pokapa loĝeja plankareo estis nur kvar kvadrataj metroj. La domoj de ĉirkaŭ du trionoj de la urbaj familioj estis troloĝataj. Ekde 1979, la registaro klopodis limigi la pliiĝon de la loĝantaro kaj samtempe stimulis komercistojn fari investojn al la domkonstruado. En 2006 en Ĉinio ĉiu urbano meznombro havis plankareon jam super 27 kvadrataj metroj.

Tamen, nun en grandaj kaj mezgrandaj urboj la prezo de loĝdomoj plialtiĝis tro rapide. Multaj urboj tute ne kapablas aĉeti novan domon. Precipe al iuj urboj en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono la manko de loĝdomoj jam iĝis unu el la urĝe solvendaj problemoj.

En 2006 la kvanto de privataj aŭtoj estis pli ol 40 milionoj, dum en 1950 estis nur 50 000. La kvanto pliiĝas rapide kaj alportas al la urba trafiko grandan malhelpon. Ŝpari energion kaj redukti ellason de malutilaj gasoj estas defioj neniam aperintaj, kiuj nun tre reale prezentas sin antaŭ la ĉina registaro kaj ties popolo.

Mu Binghua

La kreskokiferoj kiujn menciis la aŭtoro ne konsideras la inflacion. La studdepartamento de la Universitato de Groningen (www.ggd.cnet/dseries/totecon.html) havas datumbazon kun ciferoj de la tutmonda ekonomio, rekalkulitaj al la valoro de la usona dolaro de 1990. Grafikaĵo farita surbaze de ties ciferoj pri Ĉinio montras ke la reala kresko ekde 1950 estas proksimume dekobliĝo. Kompreneble, ĉiuj tiaj rekalkuloj estas tre proksimumaj. (red.)

Budhismo en Taĝikio

En Taĝikio oni rajtas konfesi ajnan religion krom fundamentisman. Oni konfesas plej vaste islamon. Ankaŭ budhismo havas siajn adeptojn, kvankam malmultnombro. Por iom ekscii pri la historio de budhismo en Taĝikio, ni turnis nin al membro de la Akademio de Sciencoj de Taĝikio, la direktoro de la Instituto pri Historio, Etnografio kaj Arkeologio, prof. Rahim Masov.

SEAN MCGRATH



MONATO: Bonvolu rakonti pri monumentoj de budhismo en Taĝikio.

Prof. Masov: Budhismo, samkiel islamo kaj kristanismo, estas plej disvastiĝinta religio¹. Dum la lastaj jardekoj sur la teritorio de Taĝikio oni elfosis kelkajn skulptaĵojn de Budho. Plej interesa kaj granda estas la Budho en nirvano. Ĝin oni elfosis apud la vilaĝeto Aĝinatepa, je 15 km for de la urbo Kurgontepa. Ĝi estis detruita. Dum multaj jardekoj lokaj loĝantoj trovis tie malgrandajn skulptaĵojn similajn al diablo kaj aliaj fabelaj bestoj. Pro tio oni nomis la apudan monteton Aĝinatepa (en la taĝika lingvo tio signifas „monteto de Diablo”).

La elfosadon en ĉi tiu loko oni komencis en 1960. Oni trovis tie ĉirkaŭ 1000 skulptaĵojn de diversaj grandoj. La skulptaĵo de Budho estis trovita en 1965, en profundo de 14 m.

Budho en la sanskrita signifas *vekiĝinta*. Ĉi tiu vorto estis la kromnomo de la reĝido Siddharta Gotama (623-544 a.K.), kiu estas la fondinto de budhismo.

En la 29a jaro de sia vivo li forlasis sian familion, kaj dum sep jaroj li vojaĝis kaj predikis. Li tre bone konis la vivon de simplaj homoj. Li diradis, ke ĉiu mem konstruas la propran vivon. Siddharta Gotama estis unu el la multaj Budhoj aŭ vekiĝintaj homoj, sed li estis la unua, kiu instruis homojn pri la metodo de vekiĝo.



Prof. Rahim Masov kaj Dina Newman.

Budhismo proklamas egalecon sendepende de socia tavolo kaj kastoj. Budhismo asertas, ke la ekzisto mem kaj ĉia deziro estas kialoj de turmento. Budhismo akceptas la morton ne kiel punon aŭ tragedion, sed kiel trapason al alia formo de ekzisto. Nirvano estas stato de memprofundiĝo en pensoj kaj liberiĝo el ĉio. La restintaj antikvaj manskribaĵoj pravas, ke budhismo venis al Tohario (teritorio de la nuntempa Taĝikio) el norda Hindio. En tiu tempo estis konstruitaj kelkaj monaĥejoj.

MONATO: Kiam tio okazis?

Prof. Masov: En la 2a ĝis 4a jarcentoj, en la tempo de la kuŝana imperio, kiu regis sur la teritorio de la nuntempaj Afganio, Irano kaj centra Azio.

MONATO: Ĉu oni rajtas diri, ke en tiu tempo la loĝantaro de centra Azio konfesis budhismon?

Prof. Masov: Tiutempe en nia regiono estis disvastiĝintaj zoroastrismo, budhismo, maniĥeismo kaj kristanismo, kvankam nun 95 % de la loĝantaro kon-



Antaŭ nia erao estis disvastiĝinta en Taĝikio i.a. zoroastrismo. Jen restaĵoj de zoroastrisma fajro-adora templo kvinmil-jaraĝa.


fesas islamon. Islamo en centra Azio en-sorbis multajn erojn de aliaj religioj.

MONATO: Vi diris, ke sur la teritorio de centra Azio estis konstruitaj budhis-maj monaĥejoj. Ĉu oni konstante loĝis

en la monaĥejoj aŭ nur tranoktis tie kaj preĝis dum vojaĝoj?

Prof. Masov: Tie oni konstante loĝis. Laŭ la dimensioj de la monaĥejoj oni rajtas konkludi, ke en ili loĝis ĉirkaŭ 100 monaĥoj. Sur la teritorio de Taĝikio estis

Budho en nirvano.



trovitaj kvin tiaj monaĥejoj. La specia-listoj de nia instituto nun restaŭras unu el ili.

MONATO: Pro kio la skulptaĵo de Bu-dho estas unika?

Prof. Masov: Skulptaĵojn de sidanta Budho ni trovas ofte, sed Budho en nir-vano – tion oni trovas ege malofte. Ni elfosis la Budhon jam detruita, ĉar dum la tempo, kiam la araboj konkeris la te-ritorion de nuntempa Taĝikio, ĉiuj mo-numentoj de budhismo kaj zoroastrismo estis detruitaj. La skulptaĵo estas 14 metrojn longa. Ĝi estis farita el argilo. La specialistoj de la mondfama muzeo Ermitejo dum tri jaroj restaŭris nian Bu-dhon. Pro tio ni ĉiam dankos al ili.

MONATO: Ĉu la muzeoj en Taĝikio havas bonajn kondiĉojn por konservi eksponaĵojn?

Prof. Masov: Bonajn kondiĉojn ni havas nur en la nova muzeo pri arkeo-logio, etnografio kaj historio, kiun ni antaŭ nelonge finkonstruis. Dum la las-ta interna milito ĉiujn eksponaĵojn, kiuj enhavis oron aŭ arĝenton, ni disdonis al la kunlaborantoj de la muzeoj por kaŝi ilin. La skulptaĵon de la kuŝanta Budho ni deponis en la kelo de la tutlanda mu-zeo. En 2001 ni, kunmetante la partetojn de la korpo de la Budho, denove ĝin rekonstruis.

En Ermitejo oni ekspozicias objek-tojn, trovitajn dum elfosadoj en Taĝikio. Nia intelektularo ofte demandas, kial oni ne redonas al ni ĉi tiujn objektojn. Tion mi ne povas kompreni. Ermitejo estas muzeo havanta tutmondan signi-fon, kiel Luvro en Parizo aŭ Brita Mu-zeo en Londono. Kun la historio de nia popolo, kun ĝia materia kulturo kaj kun ĝiaj artoj ĉiutage nun konatiĝas milionoj da vizitantoj de Ermitejo. Se ni alportos ĉi tiujn ekspoziciaĵojn al Duŝanbo, do kie ni metu ilin, kaj kie ni trovos vizi-tantojn?

Dina NEWMAN kaj Firdaŭs ŜUKUROV

1. Noto de la redaktoro: Laŭ kelkaj budhis-toj, budhismo estas nur filozofio, ne religio.

Diservoj en diversaj lingvoj

Eksterlandaj kredantoj ne malofte komparas la litovan ĉefurbon Vilnius al Jerusalemo. Ja en Vilnius ĉie videblas preĝejoj. Alilingvanoj preskaŭ ĉiutage en preĝejo povas preĝi eĉ sciante ne unu vorton en la litova. Poloj, rusoj, belorusoj, ukrainoj – ne nur tiuj minoritatoj ĝuas eblecon partopreni la diservon en sia gepatra lingvo.

En aliaj preĝejoj dimanĉe matene oni povas aŭdi preĝojn kaj preĝkantojn ankaŭ en la angla kaj la germana. La pastroj diras, ke en tiuj diservoj partoprenas ne nur eksterlandanoj, sed ankaŭ litovoj, kiuj volas perfektigi siajn konojn pri tiuj lingvoj. Somere en tiuj diservoj oftas turistoj.

Fremdlingvajn diservojn kutime partoprenas oficistoj de alilandaj ambasadejoj. Oficistino de la germana ambasadejo, Irja Berg, rakontis, ke en sia gepatra lando ŝi preskaŭ ĉiudimanĉe iradis al la preĝejo. Translokiĝinte al Vilnius, ŝi nur komencas lerni la litovan lingvon. „Mi tre ĝojis eksciinte, ke ankaŭ ĉi tie okazas diservo en lingvo, kiun mi komprenas”, diris la virino, kiu nun estas ofta partoprenanto de la diservo, en la evangelia luterana preĝejo. Ŝia opinio, la fremdlingva diservo ankaŭ kontribuas socialaspekte – en la preĝejo eblas konatiĝi kun aliaj, trovi novajn amikojn. Tio estas tre grava, kiam oni estas novulo en fremda urbo.

La brita ambasadoro Colin Roberts laŭdis la fremdlingvan ideon de la pastroj, dirante, ke por kredantaj britoj tio estas unu el la pluraj aferoj, kiuj kreas bonan vivĉirkaŭon.

Dimanĉe je la naŭa kaj duono en la evangelia luterana preĝejo de Vilnius komenciĝas diservo en la angla. La plimulto de la preĝantoj estas eksterlandaj diplomatoj. Unufoje monate ĉi tie oni ankaŭ preĝas en la germana. La helpantino de la pastro, Irena, diris, ke la germanoj kutime partoprenas la anglalingvan diservon, en kiu ankaŭ multas britoj, usonanoj, skandinavo, danoj.



Preĝejoj abundas en Vilnius

La virino rimarkis, ke la kvanto de la preĝantoj ofte dependas de la religio de la ambasadoro mem. Se li estas fervora kredanto, sekve ankaŭ aliaj oficistoj de la ambasadejo pli aktive vizitas la preĝejon. Ŝi menciis pri la edzino de eksa norvega ambasadoro. Ŝi estis aktiva partoprenanto de la diservo kaj sekve ankaŭ pliaj oficistoj de la tiulanda diplomata servo vizitadis la diservon.

Irena rakontis, ke inter eksterlandaj paroj ne maloftas, ke unu apartenas al unu religio, alia – al alia. Ili kompromi-

sas dimanĉe vizitante protestantan kaj ankaŭ katolikan preĝejon. La diservon servas pastro el Usono, Robert Jones.

Anglalingva diservo okazas ankaŭ en la preĝejo de la Bernardanoj. Tio estas iniciato de franciskanaĵoj. En la preĝejo de la Sankta Triunuo la diservo okazas en la ukraina lingvo. La pastro rimarkigis, ke lastatempe en Vilnius plimultiĝis ukrainoj, kiuj venas por ĉi tie labori. Ili dimanĉe volonte venas por preĝi.

LAST

Simpatia vulgariga fakliteraturo



la historion de la bavara duko Vilhelmo la 4a, kiu dekretis, ke por biero oni uzu nur hordeon, lupolon kaj akvon (p. 11, 12-14, 15, 110). Gisto aldoniĝis post ties malkovro, kaj evidentiĝis, ke Germanio havas ankaŭ bierojn kun tritiko, sekalo, sukero aŭ rizo, kaj ke germanoj aldonas rizerojn, citronon. Pureco do havas siajn limojn, nu, kial ne: tio estas ne malpli saniga kaj pligrandigas la varion. Pli ŝokas la aldonado de framba asperula siropo.

La aŭtoro estas naturkuracisto, kio klarigas la emfazon: unu plena ĉapitro, per si mem 15 % de la libro, temas nur pri „biero kaj sano”.

Kelkloke mi trovis (eble ŝajnajn?) kontraŭdirojn. Ekzemple, post longa klarigo pri la ekologia, kaj tial sana kultivado de hordeo en Germanio, sekvas rimarko (p. 17), ke oni multe importas hordeon el eksterlando. Aliajn frazojn mi trovis plurloke, eble pro la re-redaktado por la dua eldono (ekzemple pri plumbo kaj kadmio: p. 17/41), senalkoholaj bieroj (p. 73/79), limonadoj (p. 72/79).

La aŭtoro ne parolas pri malto el aliaj grenoj ol hordeo, kio perfekte eblas. Li dece silentas pri belgaj bieroj, eĉ en la ĉapitro pri eksterlandaj bieroj. Li ne mencias, ke la „fama konata bierfarejo

Beck's” estas parto de la belga InBev. Germanio en 2005 produktis 110 000 hl. Nenio pri la 224 000 hl de sola InBev (ankaŭ en 2005)? Konsentite, tio estas tra la tuta mondo, inkluzive la germanan Beck's. El 5000 bierspecoj, 70 % estas pilsenaj, restas 1500 aliaj; mi ne legis, ke tio estas same multe kiel en la eta Belgio. Nu jes, la libro temas ja pri germana biero.

Lingvaj eraroj estas nur kelkaj, precipe „kun” anstataŭ „per”, „je” aŭ „de” (ekz. p. 21/46/112) aŭ „nur aĉetas” anstataŭ „aĉetas nur” (p. 17). Preseraroj same, ekzemple, „fermetado” (p. 32), „kolbajsoj” (p. 47). Ankaŭ la „12000 mil homoj” (p. 47), kiuj laboras en la munkenaj bierfestoj, espereble, estas komposteraro. Ĝenerale, la libro aspektas lukse kaj bone prizorgita, pro luksa papero, granda literspaco kaj multaj fotoj. Konsideru la rimarkojn ĉi-suprajn nur belecmakuletoj.

La bierkulturo estas tipe germana: ĝi rilatas al pilsena biero. Ekzemple, ĝi estu sufiĉe malvarme verŝata (p. 8), estu verŝata en malsekan glason kaj havu norman ŝaŭmon (p. 50), ĉiam saman guston (p. 26), konsumindas je du litroj en vespero (p. 57). Ankaŭ en Belgio tiaj reguloj validas por pilsena biero (en Anglio eĉ ne), sed nepre ne por pli komplikaj bierspecoj.

Bone, mi multe kritikas, pro belga biersnobismo. Sed mi konfesas, ke mi ĝuis la fluan lingvaĵon, la sisteman superrigardon kaj eĉ la germanecajn detalojn en ĉi tiu libro. Ĝi estas admirinda kaj simpatia ero en la esperanta vulgariga fakliteraturo. Aĉetinda kaj leginda.

Marc VANDEN BEMPT

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tlf. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato

aŭ per www.retbutiko.net.

Harald Schicke: *Germanaj biero kaj bierkulturo*. Eld. MZ-Verlag, Scheessel, 2006. 119 paĝoj kudre binditaj. ISBN 3-89240-124-1.

Prezo ĉe FEL: 12 eŭroj + afranko.

La neforgesebla Ada

Ĉiu leganto de la gazeto *Heroldo de Esperanto* ĝis la jaro 1996 konas la nomon de Ada Fighiera-Sikorska. Dum 34 jaroj, ĝis sia morto, ŝi redaktis tiun valoran eldonaĵon, kaj en tiu longa tempo ŝi akiris multege da amikoj inter la esperantistaro. En ĉi tiu eta broŝuro ŝia edzo Gian Carlo Fighiera kortuŝe priskribas la lastajn penigajn tagojn de sia kara edzino, kiun li senteme nomis per la bela pola karesnomo Aduŝka, kaj kiu forpasis pro kancero en malsanulejo.

Ada Fighiera-Sikorska estis patriota kaj kuraĝa filino de patriota kaj kuraĝa patro, nome la pola generalo Władysław Sikorski, kiu mortis en misteraj cirkonstancoj en 1943 (laŭ Gian Carlo Fighiera, en la Katin-masakro). Ŝi naskiĝis en Pollando en 1929, kaj ŝiaj infanaj jaroj estas priskribitaj en ŝia verko *De tajgo al minaretoj*. Kun sia familio ŝi estis internigita en Siberion, de kie ŝi, kiam ŝi estis nur 11-jaraĝa, sendis leterojn al sia onklino en Pollando. Tiuj leteroj estas kolektitaj kaj eldonitaj, kaj ŝia edzo skribas, ke la vivo-vera biografio rakonto, bazita sur ili, „estas iamaniere komparebla – pro historia kadro, drameco

kaj infana spontaneco – kun la taglibro de Anne Frank”.

Tamen la recenzita verketo rilatas ne al ŝia frua vivo, sed al ĝia doloriga fino. Kun granda amo kaj malĝojo – sed samtempe kun tute pravaj admiro kaj fiero – ŝia edzo rakontas, kiel tiu kruela malsano senigis nin de unu el la plej admirindaj anoj de nia malgranda kultura komunumo. Estis evidente, ke li faris ĉion eblan por malpezigi ŝian suferon. Li limigis la nombron de samtempaj vizitantoj al ŝia hospitala ĉambro kaj petis, ke ili restu ĉe unu flanko de la lito „por eviti, ke Ada turnu la kapon (kio kaŭzis doloron)”. Li eĉ aranĝis, ke nur florbukedoj ruĝaj kaj blankaj – la koloroj de la flago de la profunde amata hejmlando de Ada – estu liverataj al ŝia ĉambro en la hospitalo. (Parenteze, ĉi tie troviĝas bonaj konsiloj por homoj, kiuj devas zorgi pri familianoj aŭ amikoj, kiuj – same kiel la patrino de mia edzino – simile estas mortontaj pro tiu senkompata malsano.)

Post la morto de Ada estis plurloke raportite pri la honta konduto de la homo, al kiu estis transdonitaj la posedo kaj redaktado de la gazeto *Heroldo*



de Esperanto. Gian Carlo ne povis ne menci tiujn perfidon kaj ofendon al la memoro kaj al la sindona laboro de sia nobla kaj karega edzino.

Ĉiu generacio devas relerni la lecionon, ke la indiferenta universo ne garantias justecon al siaj gefiloj. Tiom ofte la plej bonaj personoj en la mondo estas submetataj al homa kruelaĵo, korpa doloro kaj seniluziigo. Kiam mi studis la portugalan literaturon, mi lernis soneton de Luís de Camões, la nacia poeto de Portugalio, kiun oni povus tiel traduki:

*Bonulojn ĉiam vidis mi
Suferi pro peza turmento
Sed eĉ pli surprizis min
Ke ofte naĝas malbonul'
en maro de plena kontento ...*

Ni multegon ŝuldas al tiuj, kiuj donas al la homaro tiel dediĉitan servon kaj tiom noblan ekzemplon kiel Ada Fighiera-Sikorska. *Pacon al ŝia cindro.*

Garvan MAKAJ

Gian Carlo Fighiera: *La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka*. Dua eldono. Eld. UEA, Rotterdam, 2006. 32 paĝoj vinktitaj, ISBN 92-9017-094-8.

Prezo ĉe FEL: 2,50 eŭroj + afranko.

Ada Fighiera Sikorska kun William Auld, en Toledo.



Stilo rekta, senafekta, pri reala mondo malperfekta

La unua novelaro de Lena Karpunina, *La bato* (2000), tuj prezentis talenton jam esence maturan, seriozan, kviete potencon kaj foje potence malkvietigan. Ŝia dua novelaro, *Neokazinta amo*, konfirmos ŝian reputacion.

Temas pri 15 prozaĵoj: noveloj, foje eble sugestitaj per personaj spertoj; ses temas pri la sovetiaj koncentrejoj, la gulago, en la epoko de Stalin. Ĉiuj havas tiun facilan legeblecon, kiu ofte kostas al aŭtoro malfacilan verkadon.

Kvankam ironio aperas ofte, kaj humuro foje, mi sentas, ke la ĝenerala etoso estas sombra, malgraŭ pluraj ekzemploj de homa kuraĝo, eltenivo aŭ bonkoreco. Nu, koncentrejoj estas ja suferegejoj; sed alimaniere karakterizaj estas rakontoj pri atendita brila libertempo en Egiptio – makulita per cinikaj trompoj; aŭ pri avino, kiu urĝe petis viziton, sed tuj forsendas parencojn, alvenintajn post sin-ofere malfacila vojaĝo; aŭ pri dediĉita „bestamiko”, frue forgesita de supozitaj kolegoj sendankaj – el kiuj unu „modele personigas nesatigeblan kaj egoisman naturon de la homa speco”.

Lena Karpunina ne mem spertis la gulagon; ŝi naskiĝis jarojn post la morto de Stalin; sed ŝi sendube aŭdis rememorojn, kaj ŝia frua vivo en Rusio kaj Taĝikio havis siajn rigorojn. Al tiuj, kiuj, kiel mi, fortune vivis en landoj relative liberaj kaj prosperaj, la nuna libro enhavas pensigajn lecionojn pri fremdaj suferoj kaj diversaj reagoj. Ni ricevas impreson de serioza realismo, plena kredebleco, animprema scipovo pri la mondo.

La libro lasas ankaŭ impreson pri vera scipovo de nia lingvo: jen vera klareco, stilo tute internacia, modeste zamenhofeca, rekta, kaj komprenebla, tiel ke mi povas rekomendi ĉi tiun literature meritan verkon ankaŭ kiel legolibron por progresemaj lernantoj, simile al la romanoj de Julio Baghy. La verkisto celas komuniki pli ol uniki!

Post la aĉa recenzista devo, serĉi erarojn, mi mencias nur unu trovitan: „haro” anstataŭ „hararo”, tre eble, en sia kunteksto, preseraro. Tre eble „doloroj” por „dolaroj” (p. 92) estas intencita ŝerco pri lingva eraro de (malestiminda) agen-



to, kiu ja donis dolorojn kontraŭ dolaroj!

Pliriĉigas la libron valora, perceptema enkonduko de Sten Johansson. La aranĝo kaj presado estas tute bonaj. Se mi devas montri muŝojn en la mielo, mi menciui, ke du el la piednotoj troviĝas sur malĝustaj paĝoj.

Ne estas surprize, ke 6 el la 15 noveloj ricevis premiojn aŭ menciojn en Belartaj Konkursoj de Kongresoj. Ni esperu pri pluaj volumoj.

Marjorie BOULTON

Lena Karpunina: *Neokazinta amo*. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno 2007, 149 paĝoj, ISBN 90 7706628 7.

Prezo ĉe FEL: 15,00 eŭroj + afranko.



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandano. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbadaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturaj.

Donald Broadribb pri ĝi komentas: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.”

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima libroj.

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 € + afranko.

En granda urbo

Dimanĉe Bernd kaj Erika Ŝmidt decidis promeni en la urba arbaro Grunewald. La pasinta semajno estis malfacila kaj hektika, – Bernd laboris kiel programisto en granda firmao, Erika vendis florojn en malgranda florbutiketo, – kaj nun ili volis nur ripozi kaj prepariĝi por la nova laborsemajno.

La pasintan nokton neĝis la unuan fojon en tiu ĉi vintro, kaj kvankam la veterprognozo „promesis”, ke jam morgaŭ ĉio degelos kaj la temperaturo plialtiĝos, hodiaŭ la neĝo ankoraŭ beligis vojojn kaj arbobranĉojn, kaj oni havis deziron vagadi en la trankvileco de la arbaro, forgesinte la bruadon de aŭtoj, la streĉon de la granda urbo, aŭskultante nur la kvietan knaradon de la neĝo sub la piedoj kaj la pepadon de la birdoj.

Varme vestiĝinte kaj ŝlosinte la pordon, la geedzoj venis al la lifto, sed rimarkinte, ke ĝi estas okupita – la flava lampeto lumis – ili malsupreniris la ŝtuparon perpiede. Grunewald troviĝis, laŭ la ĉefurbaj, berlinaj mezuriloj, proksime: oni devis atingi en dudek minutoj la bushaltejon, kaj poste veturi kvaronan horon al la arbaro, kiu troviĝis ene de la urbaj limoj.

Malsuprenirante de sia sesa etaĝo ili ekflaris en la ŝtuparejo akran malagrablan odoron, kiu plifortiĝis en la subaj etaĝoj. La geedzoj malofte iris piede la ŝtuparon, preskaŭ senescepte ili uzis la lifton, ĉu supren, ĉu malsupren, kontraste al iliaj najbaroj, kiuj, estante ĉirkaŭ kvardekjaraj, same kiel Ŝmakoj, iris la ŝtuparon ĉiam piede. „Por trejnado de la koro,” ili klarigis, „anstataŭ sportado, por kiu la tempo ne sufiĉas.”

„Ie muso putras,” diris Bernd, tordante la vizaĝon, „morta muso aŭ rato...”

Je liaj vortoj Erika ekmemoris, ke antaŭ pli ol semajno, kiam la lifto estis okupita en unu el la supraj etaĝoj, kie laboristoj riparitis loĝejon, ŝi jam per-



ceptis tiun ĉi odoron, kaj suprenirante la ŝtuparon, malfermis ĉiujn fenestrojn en la ŝtuparejo. Tamen la odoraĉo, kiel ŝi nun konstatis, ne foriris. Ŝi ankaŭ ekmemoris, ke simila odoraĉo ŝvebis en la ŝtuparejo dum kelkaj monatoj, kiam ilia najbarino forveturis por la tuta somero en Turkion. En la loĝejo restis katino kaj hundeto. Iu virino venadis unu fojon tage por manĝigi la bestojn, kaj kiam ŝi malfermadis la pordon, el la najbara loĝejo fluis neeltenebla haladzo, kaj pendis en la aero dum horoj. Verŝajne ŝi nur manĝigis la bestojn, sed neniom purigis la ejon. Nur kiam la maljuna turkino revenis, la fetoro ĉesis eliri el ŝia loĝejo.

„Kaj nun denove la sama,” pensis Erika, „Kiel la najbaroj, trejnantaj siajn korojn kaj minimume dufoje tage traŭrantaj ĉi tie, povas elteni tiun fiodoron?”

La Ŝmidtoj enrigardis la poŝtkeston kaj eliris al la freŝa aero de la strato. La doma enirpordo estis malfermita, ekstere apud ĝi staris en siaj verdaj uniformoj du policistoj kaj iu ĉirkaŭ 45-jaraĝa viro kun ruĝiĝintaj okuloj.

„Ĉu io okazis?” demandis Erika la pli grandan policiston. Ŝi jam vidis lin foje kaj supozis, ke tiu estis la respondeculo

pri ilia distrikto. La policisto triste ekrigardis ŝin per siaj malgrandaj helaj okuloj kaj eviteme respondis: „Ni rajtas nenion diri.”

„Evidente io okazis,” pensis Erika, sed laŭte diris, „Pardonu min, eble vi estas malĝusta adresato, sed en nia ŝtuparejo ŝvebas neeltenebla fetoro... Ŝajne mortinta kato aŭ rato putras ie.”

Ŝi jam volis foriri, kiam ŝi ekaŭdis la respondon de la policisto: „Ĝuste pro tio ni estas ĉi tie.” Ŝi tuj denove returniĝis al la policisto: „Tio signifas, ke tamen io okazis?”

Bernd, jam foririnta de la enirpordo, iom eknervozigis. „Tio ja tute ŝin ne koncernas, kio tie okazis,” li pensis, „ĉiam ŝi interesiĝas pri ĉio: kial mankas la lumo en la ŝtuparejo, kial oni la rubaĵon ĝustatempe ne forveturigis, kaj nun ankoraŭ tiu ĉi fetoro... Nu, kia diferenco?”

Sed aŭdinte la respondon de la policisto: „Jes, io okazis, en via domo mortis homo,” ankaŭ li returniĝis kaj reiris kelkajn paŝojn al la enirpordo. Nun iĝis klare, de kie venis la fetoro.

„Ki-o? Mortis iu el la najbaroj?” demandis Erika ŝokite, „Kiu?”

„Ni ne rajtas tion diri,” ripetis la pli granda policisto.

„En kiu etaĝo?” denove ŝi demandis, ne esperante tamen ricevi la respondon.

„En la unua,” sekvis la respondo.

„Sur la unua ni konas neniun krom la sinjoro Ansbah,” ŝi daŭrigis malrapide, „Ni loĝas en la sesa kaj malofte uzas la ŝtuparon piede. En la lastaj jaroj pluraj malnovaj loĝantoj translokiĝis, kaj la novajn ni tute ne konas...”

„Tamen,” riproĉe oponis la policisto, „En tiaj okazoj estas pli bone foje senkaŭze voki la policon ol tro malfrue...”

„Nu, kiu povis scii tion?” parolis Erika kvazaŭ senkulpigante sin. „La vero estas, ke laodoro jam delonge sentiĝis en la ŝtuparejo... Kiel longe restis la mortinto en la loĝejo?”

„Neniu scias,” estis la respondo. „Tuj venos patologo-anatomiisto, li determinos tion...”

„Kiu povas esti la mortinto?” demandis Erika kvazaŭ sin mem, kompreninte, ke la policistoj nenion plu diros. Ili opinias sin jam babiluloj.

„Ah, jes...” subite diris la tria viro, ne policisto. „Kial kaŝi tion... Valter mortis, mi estas lia frato...”

Nur nun Erika ekrigardis la viron, komprenis, kial li havas ruĝajn okulojn kaj rimarkis la starantan apud li hundeton Djeki, kiu ĉiam akompanis la sinjoron Ansbah. Erika ne sciis, ke Ansbah nomiĝis Valter. Ŝi ankaŭ rimarkis la proksime parkitan aŭton, sur kies malfermita kofrujo sidis kaj mallaŭte ploris virino, supozeble la edzino de la frato.

„Pro kio li mortis? Li ja ne estis maljuna, eble 53-jaraĝa,” mallaŭte diris Erika kaj, rigardinte al la hundo, aldonis: „Ĉu Djeki sidis la tutan tempon sen boji en la loĝejo?”

„Jes, ĝi estis la tutan tempon tie,” konfirmis la frato de Ansbah. „De kio li mortis, oni dume ne scias...”

Sinjoro Ansbah estis unu el la plej malnovaj loĝantoj de la domo, li vivis en ĝi jam 30 jarojn. Kaj nun ankaŭ ĉi tie li mortis, tiel subite kaj nerimarkite por ĉiuj.

Kiam Erika kaj Bernd antaŭ multaj jaroj translokiĝis al ĉi tiu domo, la unua

najbaro, kun kiu ili konatiĝis kaj kiu amike salutis ilin, estis Ansbah. Tiam li havis alian hundon, blankan batalhundon, kiu ĉiam havis bandaĝitajn gambojn. Ansbah surbrake portis la hundon al bestkuracisto, flegis ĝin, sed ĝi tamen post iom da tempo mortis. Post iom da tempo Ansbah havigis al si multe pli malgrandan hundeton de la raso Djek-Rassel, tiun ĉi Djeki. Ĝi estis blanka kun brunaj makuloj. Foje li diris al Ŝmidtoj, ke ĝi ne tiel bone, kiel la antaŭa hundo, taŭgas por li pro ĝia karaktero: ĝi estas tro vigla, iom stulteta kaj postulas tre longajn promenigojn. Kaj vere oni ofte povis observi, ke Djeki kuris en tute alian direkton ol Ansbah, kiam li promenis kun ĝi en la proksima parko aŭ surstrate. Aŭ ĝi, suprenirante la ŝtuparon, preterkuradis sian etaĝon, kaj Ansbah devis revoki ĝin.

Ansbah estis mem altstatura viro kun bluaj okuloj kaj pompaj lipharoj. Laŭaspekte li estis ege sporta, kun fortikaj gamboj kaj kolo kaj kun risorta irmaniero. Ofte li biciklis, tiam Djeki sidis malantaŭe en korbo. Laŭprofesie Ansbah estis laboristo-konstruisto kaj vivis sola. Erika ofte vidis lin, kiam li revenis de la laboro en sia kombineo, malpurigita de diversaj farboj. Liaj laborvestaĵoj estis de aparta fasono kaj aspektis eĉ pimpe ĉe li. Antaŭ kelkaj jaroj Ansbah perdis la konstantan laboron kaj de tiam li restis senlaborulo, fojfoje laborante neoficiale kaj hazarde: al iu li muntis la seruron, al la alia riparis la loĝejon, foje li laboris ie nokte.

Dum iu tempo oni ofte vidis lin kun virino, kiu ankaŭ havis hundon. Ili komune promenis kun la hundoj, supozeble ili konatiĝis danke al la hundoj. Erika ĝojis por li, ke li ne plu estis sola, sed kun amikino. Sed poste la virino malaperis, kaj ankaŭ Ansbah mem estis videbla malofte. Lastan fojon Ŝmidtoj vidis lin malfruaŭtune kaj demandis lin, kie li estis la tutan someron, pro kio oni ne vidis lin. La najbaro rakontis, ke li posedas somerdometon apud Berlino, kaj tie en la naturo li kun Djeki pasigis la varmajn monatojn. Kaj jen nun – la lasta renkontiĝo, se oni povus nomi tion „renkontiĝo”.

Erika kaj Bernd adiaŭis la policistojn. Poste ili veturis al la arbaro, kaj ambaŭ pensis pri Ansbah. Finfine Erika diris: „Estas terure tiel morti, ĉu ne? Mi pensas, ke li tiel kuŝis preskaŭ monaton... Lastfoje ni vidis lin komence de decembro...”

„Kiom longe li kuŝis morta en la propra loĝejo, tio fakte ne estas tiom grava,” pripenseme diris Bernd, „Kvankam tio sonas makabre. Multe pli tragika estas tio, ke oni povus savi lin, se iu estus proksime de li, se estus veninta medicina helpo...”

„Mi neniam pensis, ke tio povus okazi en nia domo,” diris Erika, „Kutime oni legas pri tiaj okazaĵoj en gazetoj, tio okazas ie, malproksime, ne apud vi... Kaj la plej ŝoka afero estas, ke similaj okazaĵoj plioftiĝas, iĝas kutimaj en grandaj urboj, kie homoj ne nur vivas, sed ankaŭ mortas solece, izolate, kie najbaroj ofte ne konas unu la alian, kie la ĝirado de la lupago funkcias aŭtomate, kaj se oni ne havas laboron, kiel Ansbah, tiam neniu rimarkas, ke iu homo ne plu aperas. Ĉe la fino oni restas nur kun sia besto, se oni ĝin havas. Ĝi povas esti fidela amiko, sed ĝi ne povas voki ambulancon...”

Poste ili promenis en la arbaro. Estis bonega vintra vetero. La unua freŝa neĝo kovris la teron, brilis malalta vintra suno, sed la tago estis malserenigita. Sur ĝi kuŝis la ombro de granda, sporta viro kun bluaj okuloj.

Post kelka tempo venis laboristoj kaj tra la fenestro elĵetis el la loĝejo de Ansbah sur la pavimitan straton liajn aĵojn: grandan nigran matracon en gaje aspekta flava tegaĵo, lignan bretaron, elektraĵojn.

Akra odoro de putranta homa karno ŝvebis ankoraŭ kelkajn semajnojn en la ŝtuparejo, kaj la infanoj, irante laŭ la ŝtuparo al kaj el la lernejo, ridis kaj fermis la nazojn. La vivo daŭrigis sian nehaltigeblan fluon.

Onidire, Ansbah havis malsanan koron, kaj oni konkludis, ke li mortis pro la koratako. Supozeble li mortis subite: falis sur la tapiŝon kaj ne sukcesis alrampi la telefonon.

Lena KARPUNINA

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por fami-liaj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Natu-rista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Esperantistaj foto- kaj filmamatoroj, vizitu www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj ver-koj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR

30 USD

aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6587

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + aŭfranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be